

# ESPERANTO TRIUMFANTA

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.  
Aperas semajne. — Senpagaĵ monataĵ aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Profektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa  
W.M. Page, advokato, Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gill Norta, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-  
direktoro, Kaunas.

N-o 207  
31. 8. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro  
aŭ 0,30 sv. fr. por lando, kies valuto  
sufiĉis maksimume 50%; por ĉiuj aliaj  
landoj 0,08 dol. aŭ 0,25 sv. fr.

Anonprezo

po kvadrata-centimetro egalvaloro de  
0,20 sv. fr. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fr.),  
en „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

## La Deksesa.

(Daŭrigo.)

### Diversaj aranĝoj.

„La Malŝparulo“. — Internacia Kabaredo „Vesperto“. — Fesiprezentaĵoj de „Aida“. — Kongresa Bulteno. — Ĝenerala kritiko. — La sekvonta kongreso. — Kotizo.)

Duspecaĵ estis la prezentaĵoj sur sceno farataj dum la Deksesa: „La Malŝparulo“, komedio de Raimund, tradukita de kol. Zwach, en Bürger-Teatro, prezentaĵ de profesiaj aktoroj, kaj kabaredaĵoj de „Vesperto“, prezentaĵoj de rondo da diletantoj. La kritiko devas esti diferencigata laŭ tio.

La prezentaĵoj de la kabaredo estis kontentaj, se oni konsideras, ke la agantoj estis plejparte diletantoj; ili klopodis laŭ sia plej bona povo, kaj jam la bona volo meritas laŭdon.

La prezentaĵoj de „La Malŝparulo“ estis eĉ bonega. Mi ne volas kritiki detale, mi mencias nur la nomojn de la ĉefaj aktoroj kaj reĝisoroj: Altring, Kurth, Müller, Schickelanz, Schmidt, Wawra, Zeska, la fraŭlinoj Brenneis kaj Gedek;rome gesinjoroj Starke, kiuj kun granda sukceso kunagis jam pasintan jaron en Nürnberg ĉe „Natan la Saĝulo“ kaj kiuj intertempe ankoraŭ sukcesigis sian plibonkon.

Bedaŭrinde ambaŭ prezentaĵoj de „La Malŝparulo“ estis malmulte vizitataj; sed la ĉeestanta publiko estis tre kontenta kaj aplaŭdegis.

Ankaŭ la kabaredo estis malmulte vizitata; almenaŭ en la prezentaĵoj, kiuj mi ĉeestis, mi kalkulis apenaŭ cent aŭskultantojn.

Sajnas al mi, ke la granda deficiĵo de la kongreso (oni parolas pri pli ol mil dolaroj) estas parte kaŭzita de la malsukceso de la teatraj prezentaĵoj laŭ financa vidpunkto. Kio estas la kaŭzo de la malbona vizito? Eble la fakto, ke Wien kiel milionurbo havas tro multe da allogaĵoj por fremduloj kaj ke la eksterlanda vizitantoj presere viziti la fame konatajn prezentaĵojn en la ĉefaj teatroj kaj operejoj. Krom tio, ĝuste dum la tagoj de l' kongreso okazis la grandiozaj fest-prezentaĵoj de la opero „Aida“ de l' itala komponisto G. Verdi sur liberaa sceno. La prezentaĵojn partoprenis mil geaktoroj, inter ili la plej famaj de Italujo. La orkestron direktis Pietro Mascagni, kies nomo estas konata tra la tuta mondo (li estas kompostisto de la opero „Cavalleria rusticana“). La areno antaŭ la sceno, kie okazis la prezentaĵoj, havas lokon por 25000 personoj. Estas do ne mirige, ke la plimulto de la kongresanoj deziris ĝui almenaŭ unufoje tiun ĉi maloftan prezentaĵon.

Kelkajn vortojn mi volas ankoraŭ diri pri la ĉiutaga Kongresa Bulteno. Ĝi estas bonaspekta kaj bone presita; sed la enhavo ĝenerale ne kontentigas la kongresanojn, ĉar ili ne trovis en ĝi ĉiujfoje la freŝajn raportojn pri la kunigoj de la antaŭa tago. Parolo de la Majstro, ĉefartikolo, lia poemo, programoj, ilustraĵoj pri Wien kaj Italujo — ĉio estis tute bona; sed mankis tio, kion la kongresanoj deziris precipe trovi: ĉiujfoje raporto pri la antaŭa tago kaj aktualaj ilustraĵoj pri la kongreso (portretoj de konataj aŭstraj samideanoj aŭ de eminentaj profektantoj de la kongreso kaj reproduktitaĵoj de fotoj faritaj dum la kongreso).

Cetere en la unuaj tagoj oni ne sciis, ke aperis iu kongresa bulteno. Kiam jam estis presita la tria numero, oni ankoraŭ demandis min, kial ne aperas en tiu ĉi jaro ĉiutaga bulteno (de ET), ĉar oni ne jam vidis la bultenon de la L. K. K.

La Deksesa estis en multaj partoj ekzemplo por tio, kio la kongreso ne estu. Mi ne donas ĉiun kulpulon al la L. K. K.; ĝi certe laboris laŭ sia plej bona volo (escepte ĉe la korespondado); sed mi ne povas diri, ke ĝi estis tute senkulpa. Mi faras al ĝi precipe du riproĉojn: ke ĝi rifuzis la helpon de bonvolemluloj kaj ke ĝi ne sufiĉe

utiligis la spertojn de antaŭaj kongresoj. Tiuj riproĉoj estas plene meritaj, kaj al la L. K. K. de estontaj kongresoj oni devas inviti konsilio, ke ili ne faru tiujn samajn erarojn, sed male, ke ili serioze studu la spertojn de la ĝisnunaj kongresoj kaj ke ili ne ne rifuzu la helpon de bonvolaj personoj, grupoj, ĵurnaloj ktp.

En sekvontaj numeroj de ET estos malfermata diskuto pri la temo „Universala Kongreso“, en kiu ĉiu bonvolu esprimi siajn koncernajn spertojn aŭ konsilojn, por ke la Universalaj Kongresoj de Esperanto ne fariĝu pli malbonaj de jaro al jaro, sed ĉiam pli bonaj, pli perfektaj kaj pli efikaj.

Mi volas en tiu ĉi loko ankaŭ protesti — kaj mi scias, ke per tio mi parolas en la senco de l' plimulto de la kongresvizitantoj — kontraŭ la emo de kelkaj personoj forlasi nian kutimon de ĉiujara Universalala Kongreso. Ni bezonas ilin por almenaŭ unufoje en la jaro renkontiĝi pace kaj samideane, ni bezonas ilin por manifesti al la mondo pri nia jama forto kaj pri nia firma volo, ne ĉesigi nian batalon kontraŭ la antaŭjuĝoj kaj la indiferenteco de l' mondo, ĝis la venko estos certigita. Ni volas konservi nian ĉiujaran Mondfeston, nepe ni volas konservi ĝin, sed la pezaŭrinda, ke ni la venonta jaro. Sed mi firme kiel samideanoj, kiuj invitis nur por 1926, ankoraŭ pripensas la aferon kaj agos kun freŝa kuraĝo. Se ili utiligos la spertojn de la ĝisnunaj kongresoj kaj precipe tiujn de la ĵus pasinta wiena kongreso, se ili laboros kune en bona harmonio kaj laŭ taŭge difinita plano, kaj se ili sufiĉe frue komencos la preparojn, — mi estas certa, ke ili sukcesos.

Ne estas necese, por la sekvonta jaro aranĝi grandiozajn aferojn; sufiĉas la tradicia interkonataĵa vespero, tute senĝena; la solena malferma kunveno en sufiĉe granda salono; festkoncerto kun esperanta programo; unu aŭ du laborkunidoj, en kiuj oni ne parolus pri enuĝaj organizadaj demandoj kaj regularoj sed pri l' interesaj aferoj, aŭ en kiuj oni aŭdus paroladojn de eminentaj samideanoj pri diversaj interesaj temoj; kaj la fakkunidoj. Ĉu oni aranĝos teatran prezentaĵon aŭ kabaredon aŭ balon, tio dependas de cirkonstancoj. Internacia kostumvespero kun dancoj estas ĉiam rekomendinda, se troviĝas sufiĉe granda salonego por ĝi, ĉar ĝi havas ĉiam multnombrian partoprenantaron; sed se tia salonego ne estas trovebla, eventualaj gedancemuloj havas ankaŭ alian okazon por kontentigi sian emon.

Alia demando estas pri la kotizo. Kelkaj gesamideanoj opinias, ke la ĝisnunaj kotizoj estas tro altaj. Mi opinias malsame. Kiu povas fari longan vojaĝon al fremda lando, tiu certe trovas ankaŭ la relative malgrandan sumon por pagi kotizon sufiĉan por garantii, ke la kongreso ne havu deficiĵon. Certe jen prezentiĝas la bedaŭrinda fakto, ke multaj samideanoj tute ne povas fari kongresvojaĝon; sed tion ili ankaŭ ne povas, se la kongreskotizo estus malaltigata aŭ tute nuligata. Nur al junuloj, kiuj kontentigas per komuna loĝejo ktp. kaj kiuj entute vivas tre modeste dum la kongreso, oni povus doni ankaŭ konforman rabaton je la kotizo.

### Sur Danubo.

Adiaŭ, Wien!

Por diri la veron: la adiaŭo de vi afliktas min ne tre multe. Mi vidis viajn stratojn kaj placojn, mi admiris viajn palacojn kaj preĝejojn de ekstere, mi promenis en viaj parkoj kaj ĝardenoj, jes; mi ĝuis vian grandurban vivon, vian trafikon, kiu precipe ĉe la tramoj atingas grandan dimension; mi partoprenis vian pulsantan vivon en la restoracioj, kafejoj, dum lunbrilo en Pratero sur la amuza fervojo aŭ sur diskreta benko ie en la vasta parko, jes. Tamen la internaj trezorojn de viaj muzeoj, kasteloj ktp. mi apenaŭ vidis; tion mi ŝparas por dua vizito en iu venonta jaro.

Kaj la kongreso — ĝi ja ne estis senluziigo por mi, kiel mi jam menciis en la komenco de mia raporto, sed ĝi ankaŭ ne estis granda kontentigo; mi esperas, ke la sekvontaj kongresoj donos pli multe al la esperantista koro, eĉ se la okulo estus malpli kontentigata.

Do adiaŭ, Wien! Kaj: Ĝis revido!  
Por la momento ni estas felikaj, ke ni troviĝas sur la ŝipo. Fine!

Oni diris al ni hieraŭ, ke ni devas esti ĉe la ŝipo je 7 h. Do, ni levigis jam frue, faris longedaŭran kaj malagrablan veturadon kun niaj kofroj en plenŝtopita tramo kaj tute nenion manentagis. Tio pli ni ĉagrenigis, ĉar ni devis atendi ankoraŭ tutan horon, antaŭ ol ni povis suriri la ŝipon.

Nun ni staras sur la ferdeko kaj rigardas la forglitantan bordon. Ni estas ĉ. cent eksterlandanoj kaj kelkdeko da hungaraj esperantistoj, krom la ceteraj pasaĝeroj.

La ŝipo estas unu el la plej grandaj kaj modernaj sur Danubo; tamen kompare kun la ŝipoj, kiuj trafikis sur Rejno, ĝi estas modesta veturilo. Ĝia nomo estas „Szent Istvan“ (Sankta Stefano) kaj ĝi apartenas al hungara kompanio.

Nia postkongresa ekskurso estas aranĝita per la fremdul-oficejo en Budapeŝt kun helpo de la hungaraj samideanoj, kaj ni esperantistoj gvas lokojn en la unua klaso kun duaklasa bileto, se plaĉas al ni.

La unuan viziton mi faras al la manĝosalono. Ĝi estas tre bela kaj havas komfortajn sidlokojn. Malofte mi trinkis kafon kaj manĝis bulkon kun tia apetito, kiam mi havis en tiu ĉi mateno.

Poste oni laŭplaĉe promenas sur la ŝipo, estas jen en la unua, jen en la dua klaso, ekvidas, ekstaras, babiladas, kantas, rigardas la pejzaĝon ambaŭborde de l' riverego aŭ la ĉielon iom neklaran, kvazaŭ ĝi indikus pluvon.

Ni restos sur la ŝipo dum tuta tago. Ĉu ni ne enuos? La bordoj de Danubo estas plejparte ebenaj, melankoliaj, kovritaj per arbaro; nur malmultaj urboj aŭ vilaĝoj estas videblaj. Kaj jen eĉ guto da pluvo falas sur la nazon; pliaj gutoj sekvas. Ĉu ni ne enuos?

Tamen ne!  
Dum la pluvo ĉiu serĉas rifuĝon en la salonoj aŭ sub ia ŝirmilo. Sed la pluvo ne estas daŭra: jen ĝi rekomencas, jen ĉesas.

Nun la pejzaĝo fariĝas pli interesa. Aperas montoj, ruino sur roko. La hungaroj nomas ĝin „Dévény“; ŝajne ŝi nun apartenas al Ĉeĥoslovakio.

Ni atingas Bratislava (la iama hungara Pozsony, germane Pressburg, nun ĉeĥoslovakia). Potenca kastelo superstaras la urbon.

Hungaraj studentoj, kiuj kunveturas sur la ŝipo, komencas iredentan kanton. Ni esperantistoj parolas pri niaj propraj aferoj. Ĉe la bordo staras ĉeĥoslovakaj samideanoj kun verda standardo kaj salutas nin.

La veturado daŭras. Sur la malantaŭa parto de l' ŝipo aro da diversnaciaj gesamideanoj kolektiĝis en rondo. Ili amuzas sin per tio, ke ĉiu el ili kantas kanton en sia nacia lingvo. Komencas japana samideano Teiso Esaki, sekvas italoj, germanoj ktp.

Aliaj ludas ian ludon aŭ simple babiladas.

Iu studento hungara ekinteresiĝis sur la ŝipo pri Esperanto. Oni donis al li „Slosilon“. Fervore li lernis dum du horoj, kaj jam li komencas paroli. Kredeble li fariĝos taŭga esperantisto.

Tiamaniere forpasas la tempo.

Intertempe oni tagmanĝis, bone sed multekoste. Esperable en Budapeŝt la prezoj estos pli moderaj, alie nia monujo tro suferos.

Bela templo, staranta sur altaĵo super urbeo, altiras nian rigardon. Hungaro klarigas, ke tio estas Esztergom, sidejo de episkopo.

En Esztergom venas procesio da virinoj sur la ŝipon. Ili venas de pia pilgrimo. Ili portas kostumojn de kamparaninoj.

Ankaŭ cigano kun violono suriris la ŝipon. Li ludas melodion kaj petas rekompencan. Multaj milkrnaj moneretoj falas en lian ĉapaĉon.

— Vespere ekkrepuskas. Danubo fluas inter montoj. Aspektas kiel lago.

Flavruĝa lumstrio en okcidento. Fiera kastelruino sur alta monto: Visegrád. Fantomaj ombroj en la akvo. Belega vespera panoramo.

Kaj sur la vasta Danubo la „Szent Istvan“ estas la sola ŝipo. Trankvile ĝi trafrancas la malhelajn ondojn de l' riverego.

En Vác venas la akcepta komitato sur la ŝipon; samideanoj Matéffy kaj Halka. Ili ekzamenas la pasportojn kaj disdonas la dokumentojn: bonan planon kaj dudek vidajkartojn de Budapeŝt; krom tio la programon por la sekvontaj tagoj. Tiunmaniere ĉiu estas informita.

Noktiĝas. Mallumo regas sur la ŝipo. Nur la salonoj kaj kajutoj estas lumigitaj. Estas nun mal-facile iri de unu flanko al alia, de supre mal-supren aŭ male. Nur palpe oni povas iri antaŭen.

La humoro iom malaliĝas. Sopire oni atendas la bordiĝon de la ŝipo, kaj sopire la rigardoj sin boras tra la mallumo por ekvidi lumojn en la malproksimo.

Sed daŭras ankoraŭ longan tempon, antaŭ ol videbliĝas la sopiratitaj lumoj kvazaŭ steloj. Tie antaŭe ili aperis, plimultiĝas, pligrandiĝas.

Oni devas preni sian pakajejon el la pakajejo. Terura interpremadado ekestas tie. Plej prudente faros tiu, kiu atendas ĝis la fino. La ŝipo ja ne forkuris, antaŭ ol ĉiu restos ricevinta sian havaĵon.

Nun la urbejo estas atingita. Oni staras inter la amaso, kiu sin premas al la elirejo. Plu nenion oni vidas nek komprenas. Homoj, homoj; krioj, krioj; bruo, bruego.

Subite ekskuo! La ŝipo haltas, estas ligata — la albirdiĝejo de Budapeŝt estas atingita, kaj en mallonga tempo la tuta pasaĝeraro forlasis la „Szent Istvan“.

Agrabla surprizo atendas la esperantistojn. La konata melodio de la himno sonas al nia orelo, kantata de horo de Hungara Esp. Societo Laborista sub direkto de s-o Adám Mátyás. Sekvas originala salutkanto en Esperanto kaj kelkaj hungaraj kantoj; salutparoladoj de s-o Stefano Nagymolnár, vicprez. de Hung. Esp. Societo, kaj de s-o Bátya, nome de la laborista societo.

Post tiu bela akcepto ni estas kondukataj al diversaj hoteloj: Royal, Pannonia ktp., kie ni, lac-

(Vendredo, 15 aŭgusto, ĝis lundo, 18 aŭgusto.)

Ni kuŝas en paca dormo. Afabla sonĝo kondukas nin en fabellandon. Belega urbo konstruiĝas antaŭ nia ravata okulo. Solenaj preĝejoj kun vastaj kupoloj kaj graciaj turoj, fieraj palacoj en stranga stilo aperas el la Neni; pezaj pordegoj malfermiĝas mirakle facile, ni paŝas sub altaj arkajoj kaj troviĝas en grandiozaj haloj kaj salonegoj.

Kaj feinoj sidas sur oraj tronoj — feinoj en blankaj vestaĵoj, kun flamokuloj kaj nigra hararo kaj sangruĝaj lipoj. Kaj kavaliroj havas lokon ĉe longaj tabloj, kun pokaloj antaŭ si, en kiuj la fajra vino ardas.

Heziteme ni eniras. Ĉu estas permesite al ni, ordinaraĵ moriemuloj, trudi en la plejsanktejo de l' fabela lando? La feino en la blanka vestaĵo levigas de sur sia ora trono, kvazaŭ fulmo nin frapas ŝia rigardo —

Hela sunruido tuŝas nian vizaĝon, vekkisas nian okulon, tiel ke ĝi malfermiĝas.

Kie ni estas? Ĉu ĉio estis fakte nur sonĝo? Estis. Aŭ tamen ne! Kiam ni estas leviĝintaj, vestiĝintaj, manmanĝintaj kaj gvidataj de la budapeŝta samideanaro tra la urbo, en la preĝejoj, en la parlamentejo, en la marmoran antaŭhalon de l' juĝeja palaco, en la reĝan kastelon — jen realiĝas la sonĝo de la pasinta nokto.

Precipe la parlamentejo estas konstruaĵo de mirige bela stilo, miksaĵo de orienta kaj okcidenta stilo, kaj tiom pli bela, ĉar ĝi staras rekte ĉe la bordo de Danubo.

Ĉi tie, en Budapeŝt, Oriento kaj Okcidento ŝajnas doni al si la manon. La urbo, la moroj estas ankoraŭ tute eŭropaj; sed la plimulto de la loĝantaro, laŭ sia rasdeveno, jam ne apartenas al la eŭropaj popoloj.

La urbo havas belajn, rektajn, purajn stratojn. Oni rakontis al mi, ke tamen la hoteloj estas malpuraj, plenaj de cimoj kaj aliaj interesaj bestetoj. Pri mia hotelo (Pannonia) mi ne povas diri tion; mi trovis hodiaŭ matene fakte du cimetojn, sed mi estas certa, ke ili vizitis min jam sur la ŝipo. La hotelo estas tute moderna kaj faras tre bonan kaj puran impreson.

Nun mi daŭrigu pri la okazaĵoj en Budapeŝt. En la parlamentejo la esperantistoj prenis lokon sur la seĝoj de la deputitoj kaj de la ministroj, kaj okazis mallonga oficiala salutkun-sido en la salono de la deputitoj mem.

Vicprez. de Hung. Esp. Societo, s-o Nagy-Molnár, salutis la gastojn. Respondis japana samideano s-o Esaki.

Antaŭ la parlamentejo okazis fotografado kaj filmado flanke de la Filmkontoro de l' Ministerio por Ekstero.

Okaze de la vizito al la reĝa kastelo, kiu troviĝas sur la dekstra bordo de Danubo en urbo-parto Buda (la urbo-parto maldekstre de Danubo nomiĝas Pesti), salutis nin Episkopo D-o Antonio Nemes, la prezidanto de Hung. Esp. Societo. Respondis s-o Fischer.

Post komuna tagmanĝo en hotelo Fiume, sufiĉe multekosta kiel ĉio en Budapeŝt, oni faris ekskurson al insulo Margitsziget (Margareinsulo), idilia refreŝigejo kun hotelo, banejo, sportejo ktp. meze en Danubo.

Tie okazis vespere kabareda prezentado. Partoprenis ĝin s-o aktoro Baghi, s-o anino kantistino Kéthelgy, f-lino Gerő kaj s-oj Kalocsay, Arabeno, Morariu, Jung kaj Jan Felhke.

La tujan tagon regis plej radia sunbrilo, rekom-pence por la antaŭa pluvotago. Sed kiam je noktomezo ni forlasis la restoracion sur Margit-sziget, denove ekpluvis, kaj ni atingis nian hotelon sufiĉe malsekaj.

Sabate oni vizitis la Muzeon de Belartoj, la Agrikulturan Muzeon, la Zoologian ĝardenon kaj la urban arboreton, kiuj kuŝas ĉiuj kune ĉe la fino de Andrassy-ut, la ĉefa trafikstrato de Buda-pest, sub kiu kondukas subtera tramvojo. Menci- inde estas, ke la esperantistoj havas ĉie senpagan eniron.

Sabaton vespere okazis festkoncerto je honoro de la gastoj, aranĝite de esp blinduloj, en la Instituto de Blinduloj, sub direkto de Prof. Holey, prez. de Universala Asocio de Blindaj Esperant- istoj. En la nomo de hungaraj blinduloj salutis D-o Nikolao Bánó Dankis s-o Arabeno. La prezentadoj estis vere artaj, kaj la fremdaj gastoj dankis per laŭta aplaŭdigo.

Poste oni havis okazon viziti senpagan film- prezentadon kaj vidi sin mem sur la tolo. La filmo, kiu havas esperantan tekston, estas aĉet- ebla. (Vidu specialan noton en ET)

De la kino oni iris al la sidejo de la laborista societo, kie en ĉambro ornamita per ĉiunaciaj flagetoj, post salutparolo de la prez kamarado Nagy, la horo de la esp. laboristoj kantis la „Esperon“ kaj hungarajn popolkantojn.

La tagon oni finis per vizito al la Angol-Parko (amuza parko).

Dimanĉe okazis ekskursoj en la najbaran mont- aron. Vespere estis lasta kunveno kun la restio de la gastoj en kafejo de l' urba arboreto

panantino el Rejnlando forlasis Budapeŝton jam dimanĉon matene por veturi hejmen, kaj ankaŭ kelkaj aliaj samideanoj, kiuj intencas — kiel mi — viziti la sudslavan kongreson en Split, jam for- veturis hieraŭ.

### Tra Hungarujo.

Kial oni mensogas tiom pri fremdaj landoj, fremdaj popoloj, fremdaj institucioj? Oni diris al mi, ke estas neeble veturi triaklase tra Hungarujo kaj Jugoslavio, eĉ ne duaklase, sed ke eventuale oni povas veturi en unua klaso; ke oni devas kunpreni kontraŭinsekton pulvoron ktp. Ŝajnas al mi, se tiuj ĉi diradoj ne estas entute mensogoj, ke ili estas almenaŭ teruraj trograndigoj, aŭ ke ili estas tiaj almenaŭ sur la fervoja linio Buda- pest—Zagreb.

Nu, por esti singarda, mi ja prenis bileton de dua klaso.

Kaj nun mi sidas en la vagono. Ĝi estas tute moderna, belaspekta, oportuna kaj pura. Mi eĉ havas apartenanton por mi. Laŭ la surskribo la vagono apartenas al S. H. S. (la regno de la serboj, hrvatoj [kroatoj] kaj slovenoj), t. e. Jugos- lavio aŭ Sudslavio.

Tute precize je la indikita minuto nia rapid- vagonaro forlasis la centran stacion de Budapeŝt, ĉirkaŭveturis en granda kurvo la urbon kaj poste eniris la hungaran kamparon.

Dum iom da tempo oni povis ankoraŭ vidi la Citadelon de Budapeŝt, alte sur monto; poste oni vidis jam nur la vastan ebenaĵon.

Ni preterpasas multajn vilaĝojn. Ofte haltas la rapidvagonaro ĉe malgrandaj stacioj. Nur kelk- foje aperas pli granda urbo.

Estas varmege. La suno brilas serene, kaj dumtempe mi tiras la kurtenon antaŭ la fenestron.

Solfo min turmentas. Do mi iras en la restor- acian vagonon kaj trinkas botelon da biero. Samtempe mi jetas rigardon en la karton de de manĝaĵoj: ĝi montras timige altajn prezojn en hungaraj kronoj. Menuo kostas 60 000; vino, im- posto kaj trinkmono aparte.

Mi lasas la karton kaj rigardas iomete la vagonon. Ĝi estas hungara. Sed tre komforta ĝi estas. Kaj sub la plafono ĝi havas grandan helicon, kiu konstante turniĝas kaj kaŭzas agrab- lan ventumadon.

Post la stacio Keszőhidegkút-Gyönk (la hun- gara lingvo sonas barbare, sed ĝi posedas, eble ĝuste pro tio, iun tute specialan ĉarmon) aperas montetoj flanke de la fervoja linio. Kaj de sur la deklivoj de la montetoj salutis multaj blankaj, afablaĵ dometoj.

Antaŭ Ujdombóvár la pejzaĝo fariĝas denove ebena. Oni vidas vastajn herbejojn kun bovoj kaj ŝafoj, maizokampojn, sunflorojn, arbarojn.

Poste krepuskiĝas.

En la malproksimo videbliĝas malhela formajo: estas la kroata montaro. Unuamome mi ne povas distingi, ĉu ĝi fakte estas montaro aŭ nur strangeforma nubo. Sed baldaŭ mi certigas, ke ĝi estas montaro.

Kiam ni haltas en la hungara limstacio Gyé- kényes, ekregas jam la nokto. En tiu ĉi urbejo mi restas la sola pasaĝero en la tuta vagono.

La kontrolo de pasporto kaj pakajo okazas en la vagonaro mem kaj ne estas tre ĝena; nur la preskaŭ tuthora haltado sur la enuiga stacio ne plaĉas al mi, kvankam ĝi estas laŭplana.

En la unua jugoslava stacio Koprivnica okazas denove kontrolo.

La nomojn de la stacioj mi scias el la vetur- plano, kiun mi aĉetis en Budapeŝt. La nomŝildoj estas ĝenerale tiel nepraktike pendigitaj, ke oni ne povas legi ilin.

Cetera ambaŭ — la lasta hungara kaj la unua jugoslava — stacioj multe similas unu la alian. Preskaŭ la sama aranĝo; eĉ la samaj florkorbetoj kun egale ruĝaj floroj pendas de sub la ŝirmhalo. Tiu malgranda imagita linieto, tamen tiel potenca — la limo — supozigas, ke ili devus esti tute diferencaj, kaj kun miro oni ekkonas, ke tiu sur- pozo estas neĝusta.

Iam ambaŭ apartenis al la sama grande aŭstrahungara regno, kaj la limo ne ekzistis eĉ en imago. Estas ja ĝojinde, ke la diversaj popoloj nun akiris sian sendependecon, sed bedaŭrinde estas, ke ili samtempe starigis tiun imagitan baron — la limon.

Post Koprivnica la vagonaro jam ne haltas ĉe ĉiu malgranda stacio. Ĝi kuras al sia unua pli granda etapo — Zagreb, por poste daŭrigi la sian kuradon ĝis la Adriatika Maro.

En la vagono mi restas sola. Ankaŭ la restoracia vagono, en kiu mi vespermanĝas, estas tute malplena.

Interese estas, ke tuj post la limo malaperas la hungara manĝokarto kun la altaj prezoj el kronoj. Nun oni mendas laŭ serba manĝokarto kaj je dinaroj. Transkalkulte je dolaroj, la nova prezoj estas preskaŭ nur du trionoj de tiuj antaŭaj la limo. Certe ne malbona antaŭsigno.

### Alveno en Zagreb. Samideanoj helpas ĉiam.

Povus ekzisti tiuj legantoj, kiuj dirus, ke priskribo de vojaĝo tra Hungarujo aŭ de travizi- aĵoj en Jugoslavio ktp. ne plu apartenas al Deksesa, kaj ke do la titolo „La Deksesa“

ili ne estus malpravaj. Sed al ili mi volus respondi, unue, ke mi mem rigardas mian tutan al- kaj revojaĝon kiel unusolan kompletan kom- gresvojaĝon, kaj due, ke la formo de la titolo ne estas tro grava. Mi povus ankaŭ diri „Cirkulo la Deksesa“ aŭ „Antaŭ, dum kaj post la Deksesa“, sed laŭ mia opinio tio ne estas necesa kaj plene sufiĉas la mallonga titolo „La Deksesa“. Cetera la tagoj antaŭ kaj post la Deksesa ŝajnas al mi pli agreblaj kaj pli memorindaj al la Deksesa mem, kaj multaj aliaj gesamideanoj, kun kiuj mi parolis, opinias same.

Do, restu la simpla titolo, kaj mi daŭrigu mian raporton.

Precize je la minuto ni alvenas en Zagreb.

Mi eliras el la vagono, forlasis la stacidomon kaj tuj ekiras por trovi hotelon. Oni rakontis al mi, ke en Zagreb estas malfacile trovi ĉambrojn, ĉar ne ekzistas sufiĉe da hoteloj. Mi ne volis kredi tion, ĉar Zagreb estas metropolo de Kroatujo kun 120 000 loĝantoj; ĝi do devas havi eblecon por loĝigi fremdulojn.

Tamen, forlasinte la stacidomon, mi havas unuan momente la impreson, kvazaŭ mi estus en provinca urbo de Germanujo.

Estas nokto. Preskaŭ la deknua horo. Brilaj vicoj da lumoj, kiuj montras la direkton de stratoj. Sed mankas imponaj konstruaĵoj, hoteloj, komerc- ejoj ktp., kiajn oni kutime trovas en grandurbo apud la stacidomo.

La plimulto de la homoj venantaj el la staci- domo iras dekstren. Mi sekvas ilin. Estas sirato kun mezaltaj domoj. Sed nenie videbliĝas hoteloj.

Do, mi reiras al la stacidomo kaj sekvas tiam parksimilan strategon, tra kiu ankaŭ iras tram- vojo. Kredeble tiu bulvarado kondukas al la internaj urbo.

Jen mi vidas maldekstre ĉe iu stratangulo intense elektrajn lumojn. Ĉu hotelo? Mi legas surskribon „Kavana“. Mi eniras, demandas kel- neron. Li estas afabla homo kaj komplete in- formas min. La „Kavana“ estas nur kafejo. Sed mi povas lasi mian kofron tie en la vestgardeno. Li indikas al mi hotelon en la proksimeco. Mi dankas lin kaj foriras.

La hotelmastro estas ankaŭ afabla sinjoro; sed li bedaŭras, ke li havas nur dulitan ĉambrojn, kiu kostas 120 dinarojn. Li nomas al mi alian hotelon, kie mi eble povas ricevi unulitan ĉambrojn je malpli alta prezo.

Ĉiun interparoladon, ankaŭ jam en Budapeŝt kaj en la vagonaro, mi faris en germana lingvo. Kaj nur nun dum vojaĝo en eksterlando mi ek- konas, kiom utilas la germana lingvo kaj kiel potenca interkomunikilo ĝi estis antaŭ la milito, se eĉ hodiaŭ oni ĉie en Hungarujo kaj Kroatujo

komprende kaj parolas ĝin. La kelnero, la policanoj, la konduktoroj, eĉ la almozpetantoj scipovas pli malpli bone la germanan lingvon. Ĝi estas efektive la ĝenerala internacia lingvo por ĉi tiuj landoj estiĝintaj el la iama Danubo-monarkio Aŭstrio-Hungarujo, — internacia lingvo por kelkaj landoj, kia devas fariĝi Esperanto same ĝenerale por la tuta mondo.

Rimarkinde estas, ke en Budapeŝt kaj ankaŭ en Zagreb oni uzas la germanan lingvon tute lojale; male antaŭ tri jaroj en Praha oni ne ricevis respondon al germanlingve faritaj demandoj, sed oni ricevis afablan respondon en bona germana lingvo, se oni demandis en franca aŭ angla lingvo. Eble tio ŝanĝiĝis intertempe ankaŭ en Ĉeĥoslovakio.

— Do, mi vagas ira la noktaj stratoj de Zagreb serĉante loĝejon.

Preterpasante hele lumigitan kafejon sur granda placo, mi subite ekhaltas. Esperantaj paroloj sonis al mia orelo. Kaj jen mi renkontas helpanton en bezono — s-o D-o Maruzzi kun alia samideano staras tie interbabilante.

Oni povus demandi, kial mi ne antaŭanoncis mian alvenon al la delegio de UEA. Volonte mi estus farinta tion, sed mi ne sciis; ĝis kiam mi restus en Budapeŝt; kaj kiam fine mi sciis ĝin, estis tro malfrue por informi la delegion.

Nu, mi havis bonŝancon, kiel oni vidas. D-o Maruzzi tuj proponis gvidi min, kaj post demando en diversaj hoteloj li fine havigis al mi kontentigan loĝejon en privata domo.

Teo Jung.

## La karavano de Dresden al Wien.

La saksaj esperantistoj partoprenantaj je la XVIa en Wien kunvenis jam sabate antaŭ la kongreso en itala vilaĝo (Italienisches Dörfchen) (apud Dresden) por senĝena vespero. Ĉeestis ankaŭ multaj gesamideanoj el Dresden kaj la ĉirkaŭaĵo, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne povis partopreni je la Universala kongreso, sed volis konatiĝi la en- kaj eksterlandajn gesperantistojn, kiuj estis tiel feliciĝi veturi al Wien. Dimanĉe oni renkontiĝis en la Carolasschlöŝchen, lunde la tre interesa teksaj-ekspozicio estis vizitata; gvidis sinjoro Kärŝch, kiu sperte deklaris multajn detalojn. Lundyvespere oni adiaŭis de la afabla Dresdena esperantistaro en la Luisenhof en Loschwitz, atingebla de Dresdeno per ŝipo aŭ tramo.

Marde ni forlasis la belan „Firenze de la Elbe“ per la sama rapidvagonaro, kiu alportis la Berlinan karavanan, gvidata de sinjoro Blankenheim. Oni traveturis unue la belan Saksan Svisujon kun ĝiaj famkonataj lokoj — Bastaj, banejo Schandaŭ, Prebischtor ktp. Je la limo akceptis nin samideano doganestro, kiu helpis ordigi ĉiujn lim-malagrablaĵojn. Post kelkaj horoj ni atingis la belan Prahon, solene akceptataj de la Praĥaj samideanoj, kiuj tre afable prizorgis por ni hotelĉambrojn. Antaŭ la stacidomo jam atendis por ni rezervitaj tramvagonoj, kiuj transportis nin al la hoteloj kaj post unu-horo ree atendis nin por traveturi la urbon. Oni montris al ni multon de la belegaj vidindaĵoj de la urbo: la nacian teatron, la kongresejon de la XIIIa sur la insulo Jofin, la urbdomon kaj speciale la Hradŝchin, la famkonata kastelo. Vespere okazis senĝena kunveno kun la Praĥaj gesamideanoj en la hotelo Beranek. La proksiman tagon je la 6 h. atendis nin la rezervitaj tramvagonoj por transporti nin ree al la stacidomo. Ni forlasis Prahon je la 7 h kaj alvenis en Vieno posttagmeze. Partoprenis je la karavano el Berlino 63, el Dresdeno 58 gesamideanoj. Specialan dankon ankoraŭ foje al sinjoro Hromada, ĝenerala sekretario de la Ĉeĥoslovaka Esperantista Asocio, kiu tiel bone, gaste kaj solene kun la Praĥaj gesamideanoj aranĝis ĉion por nia restado en Praha.

Pri la Wien-aj tagoj raportis detale sinjoro Teo Jung. Mi nur diros ankoraŭ kelkajn vortojn pri la ekskurso al Semmering, okazinta jaŭdon post la kongreso, je kiu partoprenis kelkaj dekoj de gesamideanoj. Malgraŭ kelkaj pluvejoj la humoro estis bona. Oni admiris la beleegan regionon, la montojn, traveturis multajn tunelojn, por kiuj serĉemulo trovis la novan esprimon „kisejoj“, mangiĝis bone en la Südbahnhotel kaj reveturis vespere.

Vendrede multaj partoprenantoj de la du germanaj karavanoj, ĉ. 70, reveturis kune de Vieno tra Praha kaj alvenis vespere en Dresden.

C. F.

## Raporto

pri la kunveno de la Teko dum la XVIa Kongreso en Wien 1924.

La 8. 8. 1924 okazis la unua kunveno. D-o Sós (Wien) estis elektita prezidanto, D-o Aŭsterliĥ (Bardiov) sekretario. Ĉeestis 22 partoprenantoj el Anglujo, Aŭstrio, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Polujo. Ankaŭ s-ino Klara Zamenhof honoris

la kunsidon per ŝia ĉeesto. La prezidanto laŭlegis leterojn de la aŭstria ministro por instruado D-o Schneider kaj de la estro de socialaj aferoj Helly kun salutoj kaj bondeziroj al la laboroj. Samideano D-o Conscille (Lyon) avisiz pri reĝimo de Prof. Vanverts el la prezidanteco de la Teko. La kunveno ekdecidis unuanime nomigi Prof. Vanverts kaj D-o Briquet (Lille) redaktoron de la bulteno „Teko“ honoraj membroj. Post laŭleĝo de leteroj de D-o Robin, Mezei kaj aliaj korespondantoj sekvis kvar prelegoj: 1) Aŭsterliĥ (Ĉeĥoslovakio) — pri la mankoj en la scienca edukado de kuracistoj. 2) Blassberg (Polujo) prezentis rezultojn de esploroj faritaj kune kun D-o Joffe kaj Liwŝycz el Krakovo — pri simpla metodo de suker-difinado en la sango dum kuracado per insulino. 3) Primmer (Skotlando) pri subaŭtaĵ kuracigaj injektoj de homa sero. 4) Sós (Aŭstrio) pri la piorheo.

La 11 de aŭgusto antaŭtagmeze estis aranĝita veturado per apartaj tramvagonoj, por viziti la komunuman hospitalon en Lainz, la grandan urban zorgatejon en Lainz kaj la frenezulejon en Steinhof. En ĉiuj institucioj la veturintoj estis oficiale akceptitaj de la tieaj ĉefkuracistoj.

La 12 aŭgusto okazis dua kunsido kiun ĉeestis nur 8 Tekanoj el Aŭstrio, Anglujo, Francujo, Hungarujo, Jugoslavio, Polujo. La kunveno vizitis ankaŭ D-o Theunen, prezidanto de la Viena Kuracista Ĉambro, kiel reprezentanto de la Viena kuracistaro, kiu esprimis sian grandan intereson por nia movado kaj promesis dum la venontaj kunvenoj paroli jam per Esperanto. Poste oni vigle diskutadis pri plivigligo de la „Teko“ kaj elektis por unu jaro Centran komitaton por reorganizo de la Asocio kaj por propagando. En la komitato estis elektitaj la D-o Blassberg (Krakovo-Starowisna 18) kiel prezidanto Colenjak (Zagreb) kaj D-o Sós (Wien I, Tuchlauben 18) kiel kasisto. La tasko de la komitato estas propagandi por la Teko, kunmeti la mondon por ĝia revivigo kaj la adresaron de tutmondaj Kuracistaj-esperantistoj kaj medicinistudentoj.

## Alvoko.

Al ĉiulandaj kuracistoj kaj medicinistudentoj.

Ni insiste petas Vin propagandi energie por la Teko. Ne ekzistu en tuta mondo iu ain kuracisto aŭ medicinistudento ne apartenanta al la Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio. Subtenu ĝin laŭ via eblo per libera sendado de mono, por ke ni povu komenci la necesajn aranĝojn, la antaŭmilitan vivon kaj disvolvigadon. Sendu al ni vian aliĝon, la adresaron de ĉiuj konataj de vi kuracistoj kaj studentoj, kaj sendepende — sen nia perado — instigu ilin al aliĝo kaj laboro por la Teko. Aliĝojn, adresojn, proponojn ktp. sendu al D-o Blassberg (Krakovo, Polujo, Starowisna 18 aŭ D-o Colenjak (Zagreb-Jugoslavio). Monon sendu al D-o Sós (Wien I, Tuchlauben 18).

## 4-a Kongreso de „Sennacieca Asocio Tutmonda“

(Popoldomo de Bruxelles).

Dum la neŭtralaj esperantistoj kunvenis en kongreso de Wien la lab. esperantistoj el 162 aliĝintaj reprezentantoj kunvenis 90 el 14 landoj en Bruxelles de la 14—18 aŭgusto.

K-do Nathans, delegito de Transportlaborista Internacia saluti la Kongreson en Esperanto kaj deziras bon sukcesoj al la S. A. T.-movado.

La Unuiĝo de Unuecaj Sindikatoj de Rouen kaj Laborista Sportfederacio de Francujo reprezentis k-do Cuillerier. La sendependa Laborpartio kaj la Kom. Partio de Norvegiujo kaj la Federacio de Libro-industrio de Belgujo sendis saluletaron. La Internaciano de Eks-militintoj reprezentis k-do Gervois, kaj k-do Somerhausen reprezentis la Socialistan Junularon de Bruxelles. K-do Ernst Toller ankaŭ sendis simpatiolegramon. La kongreso diskutis pri la raporto de la sekretario, de la redaktoro de „S. R.“, de la aldono Literatur-Scienco de la Gazetara Informservo, de la eldon-kooperativo. Ĝi decidis eldoni semajnan gazeton „Sennaculo“ kiel daŭrigon de ĝis nun monata gazeto „S. R.“.

La kongreso decidis ankaŭ la aliĝon de S. A. T. al la Internacia Laborista Helpo.

La lastan tagon oni vizitis la ekspozicion en Gan.

## S. A. T.-Konferenco en Esch s/Alzette

(Luksemburgo) 18 aŭgusto 1924.

Post la 4-a Kongreso de S. A. T. en Bruxelles, deko da kamaradoj forveturis al Esch s/Alzette por tie diskonigi S. A. T. La kunveno okazis en la kunsidoĉambro de la Esch-a urbdomo, kie

kelkaj idistoj nin atendis kun ekspozicio. Ni tuj starigis ankaŭ ekspozicion de S. A. T.-eldonaĵoj. Ekstere du kamaradoj disdonadis propagandilojn. K-do Barthelmess parolis germane kaj klarigis kiel S. A. T. uzas Esperanton je la servo de la proletariaro. Post li, paroladis k-do Meyer en Ido kaj germane, sed ne povante montri, kiamaniere Ido servas la laboristan klason, li parolis pri ĉ, s, ĉiel, ĉiam ktp.

Nia k-do Haine trafe respondis lin kaj montris kial Ido estas komplikitiga Esperanto. Trafe ankaŭ ni komparis la S. A. T.-eldonaĵojn, t. e.: Sennacieca Revuo\* (20 paĝa kaj regule monata), Literatur-Sciencia Aldono (20 paĝa, kaj regule monata), la 320 paĝa jarlibro 1924 de S. A. T. kaj aliajn eldonaĵojn kun la sola idista bulteneto 8 paĝa „Kombato“ (trimonata), kiu tamen aperis nur 19 foje de 1911.

Poste parolis k-do M. Starr el London en Esperanto. Li diris, ke idiston li neniam renkontis en la laborista medio en Anglujo, ke la Brita Ligo de Esperantistoj Socialistaj havas 500 membrojn kaj eldonis broŝurojn por propagando kaj tradukis librojn. Ido nur povas fuŝi la aplikon de Esperanto en la servo de la laboristaro.

Resume: malgranda publiko, sed trafa agado, ĉar kelkaj miris vidante, ke „la morgaŭ mortonta Esperanto“ ankoraŭ ĉiam tre bone fartas.

M. Van Aelst.

Esperanto-Gazetoj bonvolu kiel eble plej multe publikigi tiun ĉi raporton.

## La IV-a Rumana Esperanto-Kongreso.

Tri ministerioj oficiale reprezentitaj.

Inter 2—5 aŭgusto okazis en Arad la kvara nacia kongreso, kiun ni rajte povas nomi ankaŭ internacia, ĉar ĝin ĉeestis, krom la 350 enlandaj gastoj (rumanoj, hungaroj, germanoj, rusoj) ankaŭ 82 eksterlandanoj (ĥino, anglo, italo, polo, ĉeĥoslovako, bulgaroj).

La bukreŝtan karavanan alvenintan la 2 aŭg. matene, akceptis s-o urbestro D-o Stefano Anghel.

Vespere estis interkonatiĝa kunveno en la Pavilono.

Dimanĉe matene s-o pastro Andreo Ĉe faris esperantlingvan predikon en la Minorita preĝejo. La kongreson malfermis je la 11-a horo s-o Henriko Fischer, L. K-ano kaj prez. de Rum. Esp. Soc., en la Kulturpalaco.

S-o Viktoro Băbescu, direktoro de Liceo „Josif Vulcan“ kaj reprezentanto de la Rum. Ministerio de Publ. Instruado en bela parolo akcentis la gravecon de internacia lingvo komuna, peranto de diversnaciaj kulturoj. S-o Fischer parolis en la nomo de la Ministerio por Komercio kaj Industrio kaj s-o T. Morariu en la nomo de Ministerio por Internaj Aferoj.

S-o D-o Josif kuracista-kapitano vicprez. de Rum. Esp. Soc. salutis la kongreson nome de R.E.S., poste sekvis la salutoj de la eksterlandaj delegitoj: S-o D-o Won Kenn (ĥino), s-o Harold Jackson (anglo), s-o Renato Samblich (italo), s-o Aktarĝiev, prez. de Bulgara Esp. Soc., s-o ing. J. Hartmann (pola samideano), kaj s-o M. Stacho (ĉeĥoslovako).

Post la laŭleĝo de la salutleteroj, i. a. de s-o eksministro Francu-Jaŝi kaj la salutoj de diversurbaj delegitoj, fermigis la antaŭtagmeza kunsido.

Tagmeze la urbestro donis bankedon por la honoro de la eksterlandaj gastoj. Vespere estis koncerto kaj prezentado de Esperanto-teatraĵo „Consilium facultatis“, sukcese ludita de la gesamideanoj de Timiŝoara.

Lunde matene oni elektis la kongresan estraron. Estis elektitaj: kiel honora prezidanto s-o ĝenerala Găvănescul kaj prezidanto s-o dir. S. Băbescu. La unua laborkunsido post la raporto de la malnova gvidanta komitato de la Rumana Societo, akceptis la eksigon de la komitato kaj elektis novan estraron. Novaj gvidantoj: S-o Henriko Fischer, L. K kaj s-o kapitano D-o Josif.

Posttagmeze la gastoj vizitis la ĉefajn urbajn instituciojn, i. a. la moderne aranĝitan malsanulejon kaj edukon de akuŝistinoj, la liceojn „Moise Nicora“ kaj „Josif Vulcan“ kaj fine la landfama fabrikejo de ĉampano „Andrémil“ regalis la eksterlandajn gastojn.

Vespere okazis mallonga laborkunsido kaj kongresa fermo. Oni preparolis eldonon de interna buleno kun esperantistaj informoj, samtempe oni preparolis la eksterlandan pres-aferon.

Je la deka horo vespere okazis internacia akceptvespero ĉe sinjorino kaj sinjoro V. Băbescu prez. de org. kom. Post la tosto de la urbestro la diversnaciaj reprezentantoj kaj la ĵurnalistoj delegitaro diris tostojn en nacia kaj esp. lingvoj.

La kongreso vekis ĝeneralan interesigon, pluraj centoj da lernolibroj disvendigis. Novaj kursoj estas en preparo.

La meritoj pri la bonaj kongresaj sukcesoj apartenas ĉefe al s-oj prof. St. Ferenczy kaj St. Bartha.

La V-a Rum. Esp. Kongr. okazas en Ploieŝti (apud Bukreŝti).

E. C. R.

Scienco. Naturscienco.

En Alasko falas nigra neĝo.

El Circe City en Alasko venas la interesa sciigo, ke en la altmontaroj de la lando antaŭ kelka tempo la neĝo subite aliĝis sian koloron: kiam ajn absurde tio sonus, ke la neĝo, kiu falas en miliardoj da eroj depost multe da semajnoj seninterrompe sur la suprojn de la altmontaroj en Alasko, ne plu estas blanka, sed nigra. Kelkaj altturistoj, kiuj unuafoje estis observintaj la nigran neĝon en la nordamerikaj montaroj, unue kredis, ke ili estis oferoj de optika eraro. La supozo, ke agiĝis nur pri eraro ŝajnis al la turistoj des pli versaĵna, ĉar ili jam dum tagoj vadis en neĝo kaj la blanka koloro de senfinaĵ neĝebenaĵoj ĉe turistoj, kiu ne armis siajn okulojn per neĝ- okulvitroj, ofte kaŭzas kolorblindecon. Unu el la turistoj, kiu estis farintaj la malkovron de la nigra neĝo, kelke da semajnoj poste rakontis pri la natur-mirindaĵo, sed nenie renkontis kredon. Estis malgranda ekspedicio, kiu sub la gvidado de la citita turismo ankoraŭ unufoje marŝis la vojon kaj povis konstati la verecon de la aserto, ke en la altmontaroj de Alasko la neĝo estas nigra. La natur-mirindaĵo estis restinta kelkan tempon malhela mistero; ke la neĝo sub certaj cirkonstancoj povus esti nigra ŝajnis malpli nekredibla ol la mirakla fabelo pri blanka nigrolo, ĝis kiam fine la meteorologia instituto en Los Angeles klarigis la malhelan misteron en tre simpla maniero en bulteno. "Estas tute ne nova eltrovaĵo" diras la cirkulero de la meteorologia instituto, ke troviĝas en kelke da altmontaroj de Nord-Am. nigra neĝo. Ĉi tiu fenomeno jam de jardekoj pli ofte estis observata kaj estas jene klarigebla per tio, ke ekzistas malgrandaj nigraj vermoj, kiuj ennestiĝas sin en la neĝon. Ĉi tiuj mikroskopaj bestetoj, kiuj miliardoje populumas la suprojn de niaj altmontaroj, igas aperanta sian naturan restadejon, la blankan neĝon, en nigra koloro. La grandeco de la vermoj estas tre diversa; kelke da ekzempleroj nur sub la mikroskopoj estas videblaj, kelkaj sub favoraj cirkonstancoj atingas du centimetrojn. Kiel la unutagoj ankaŭ ĉi tiuj bestetoj vivas nur maksimume dudekkvar horojn. Kiam la sunradio varmigas la surfacajn de la neĝokampoj, kiam ili rampas el etegaj ovoj kaj ĉirkaŭkrablas miliardoje en la neĝo. Kiam ĉesas la sunbrilo, ili sin boras pli-profunde en la neĝamasojn kaj la nigra neĝo subite rebelkigaĵas, por reakcepti post la apero de la suno nigran koloron. Per kio nutras sin la neĝvermoj? Ĉi tiu problemoj okupas plurajn sciencistojn, ĝis kiam fine povis esti konstata, ke en la neĝo vivas malgrandaj mikroskopaj algoj, taŭgaj por nutri organajn estaĵojn kiel estis la neĝvermoj. Ĉi tiuj algoj nur prosperas en Alasko. Per ĉi tiu cirkonstanco klariĝas, kial la naturmiraklo de la nigra neĝo nur troviĝas en la altmontaroj de Nord-Ameriko, precipe en Alasko. (El "Wiener Neues Journal" trad. Heinrich Fahnl.)

Propaganda dimanĉo en Emmerich apud Rejno.

La Esperanto-Societo Emmerich okazigos dimanĉon la 14 septembro propagandotagon por Esperanto kaj invitas ĉiujn gesamsideanojn de nia ĉirkaŭaĵo, viziti nin. Precipe ankaŭ la nederlandanoj estas kore invitataj. Turnu vin al Hans Düffels, Emmerich a. Rh. (Germ.), 's-Heerenbergerstr. 98.

Praktika propagando per filmo.

Dum la posikongresa ekskurso al Budapeŝto okazis filmofotografado de la esperantistoj el 14 nacioj antaŭ la hungara parlamento, montrante la vivan interkomprenon per Esperanto. La filmo estas montrata en ĉiuj hungaraj filmoteatroj. La Hungara Film-Kontoro A. S., Budapeŝto VI, Sze-recsen- u. 52, Filmliroda vendas ĉiujn el 35 metrojn longan filmon por esperantista propagando celo por sv. fk. 50.— aŭ mk. 50.— (sendoksto enkalkulita). Grupoj povas aĉeti ĝin kaj disponigi al filmoteatroj por senpaga propagandoprezento aŭ instigi filmpruntejon havigi ĝin kaj prunte al ĉiuj filmoteatroj. La filmo havas klarigan tekston en Esperanto.

Fotografajoj de la budapeŝta ekskurso

mendebaj po sv. fk. 0.50 ĉe fotografisto Harsányi, Váci u. 46, II (tri diversaj).

Kio estas S.A.T.

- S.A.T. estas organizita celanta meti Esp. je la servo de la proletaro tutmonda
S.A.T. estas perespartita aparato neniel politika
S.A.T. kvankam utilcela, laboristoserva, estas samtempe altideala: ĝi celas krei ĉe siaj membroj sennacian spiritosinton.
Kiajn organojn havas S.A.T. por plenumi tian taskon?
S.A.T. eldonas por plenumi tian taskon monatan revuon, itustritan kun literatur-scienca aldono: "Sennacieca Revuo"
S.A.T. eldonas per sia Eldonkooperativo gravajn verkojn el kiuj "Faŭstoj" de Goethe kaj "Eklumo" de H. Barbuse estas jam aperintaj
S.A.T. eldonas jarlibron, entenanta la adresojn de sia membraro, statistikon pri la laborista movado en la mondo kaj plej diversajn sciindaĵojn.
Kion jam faris S.A.T.?
S.A.T. okazigis 5 kongresojn, kies lasta estis honore prezidata de la fama scienculo A. Einstein
S.A.T. vekis ĉe la esp. laboristaro grandan intereson, veran entuziasmon kaj per tio certigas la sukceson de Esp. en proletaraj randoj.
S.A.T. estas lege enregistrita en Francujo. Detalojn oni petu skribante al la sidejo. Adreso: Sennaciec Asocio Tutmonda, 25 rue Boyer, Paris XX.

La plej malmultekosta libro en Esperanto Ĉiu devas nepre posedi la libron Eŭropo ĉe la abismo de Francesco Nitti iama ministrara prezidanto itala Esperanto-traduko kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro. (Preskaŭ 300 paĝoj.) Prezo 4 sv. fk. Mendu tuj! La libro al privatpersonoj okazos nur post antaŭa pago de la sumo de 4 sv. fk. plus sendoksto de 25 centimoj po ekzemplero, pagebila en la valuto de la koncerna lando, transkalkule je la kurso de la borsoj de Zürich (Revendistoj turnu sin pro specialaj kondiĉoj al la eldonejo) Skribajn mendojn adresu al: Frankfurter Societätis-Druckerei G. m. b. H. Abtlg. Buchverlag - Frankfurt a. M. Korespondi en Esperanto. --: Ilustritaj kartoj rifuzataj.

Tekniko. Utiligo de la Vento.

La utiligo de la kinetika energio en la vento estas unu el la plej grandaj teknikaj problemoj de nia aŭ eĉ de la sekvanta epoko. Kiam karbo mankas — kaj tio baldaŭ venos — oni devos movigi niajn mekanismojn per naturaj energioj. Profesoro ĉe la New York'a Universitato, s-o James Arnold prelegadas pri tiu ĉi problemoj. Principe li aprobas la utiligon de venta energio kaj certigas grandan estontecon al tiu ĉi juna teknika fakulo. Li sugestas, ke Ameriko vaste aplikas ĝin, kiam karbo malmultigos. Ĝis nun okazis multaj eksperimentoj por elprovi la efekteco de la venta mekanismo. Laste oni instalas uzinojn en Orienta Prusujo konsistantan el dekunu grandegaj ventoturbinoj kun modernaj padeloj konstruitaj en la aerodinamika laboratorio de Göttingen kaj konstruitaj de bonekonata fabriko de aeroplanoj. Eĉ en tempo, kiam ordinaraj ventoturoj ripozas, tiuj ĉi turbinoj estas en movo. Ili estas kuplitaj al akumulatoj kaj reguliloj kaj pelas dinamomasinon kiu movigas traman uzinojn. Ĉe normala vento oni produktas 40 HP, ĉe forta vento 70 HP (ĉevalpovo). La konstruiva solvo de la uzino estas simpla. Ĉiu ventoturbino estas bazita sur 15 m alta ferbetona kaj cilindra turo. Sendube en nia "epoko de eksperimentado" ni baldaŭ aŭdos pri pli novaj provoj. Jozefo Major, Oldenburg.

Stenografistoj laŭ Stolze-Schrey

Samstenografianoj kaj speciale adeptoj de la Esperanto-alifaro Stolze-Schrey-Schneeberger en ĉiuj landoj estas petataj sendi tuj sian adreson pro grava afero al s-o R. Kreuz, Red. de ET, Horren b. Köln. Samideanoj jam respondintaj baldaŭ ricevos respondon per cirkulero.

Novaj tempoj. Gazeto de la esperantista instruistaro, propagandas novan pedagogion, perlaboran lernejon kaj peredukon pacon. Petu specimenon de: M. Goldberg, Leipzig-Co. Klemmstr. 14.

Membroj en pli ol 40 landoj. Unua klubo por interŝanĝi poŝmarkojn, poŝkartojn ilustr., papercimonon ktp. kaj por korespondado kun la tuta mondo. Postula spektakcio. Fr. Jacobi, Bahnhofstrasse 29, Coblenz - Germanujo.

Anoncetoj.

- Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉigo, edziĝo, morto, okazaĵoj) gravaj esp. kunvenoj, festoj k. s.) senpage. Aliaj anoncetoj nur akceptitaj por minimume du sinsekvaj enpresoj, kosta po du enpresoj kaj = vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Abonantoj ĉe kiuj ni povas depreni la pagon de la abonkonto, ĝuas por propraj anoncetoj preferan prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2.—mk., prefere prezo por postabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikaĵo.
GERMANAJ TURISTOJ! Du samideanoj, naturamantoj de la "Flandra Turista Unuiĝo" deziras bicikle traveturi Reinlandon. Alveno en Köln la 31 aŭgusto; reveno tie la 7 septembro. Celo: vizito de la Rejnbordejoj ĝis Mainz-Frankfurt. Kiu germana samideano volas partopreni kun ni? Ni deziras korespondi pri tiu temo kun gesamideanoj de la Rejnregiono; bildkartoj (bfl.) (Ni estas 25 jaraĵ.) Remi Van Eynde, Liitbreidingsstraat 184, Berchem-Antwerpen, Belgio. [1]
FOTOGRAFAJOJ DE ESPERANTA-KARAVANO, kiu veturis trans Praha 5. 8. al XVI-a Universala Kongreso en Vien estas riceveblaj por kr. 2.— (kr. 0.50 en poŝtmarkoj) eĉ K J Helebrant, Skolska S, Praha II, Ĉeĥoslovakio. [2]
GRANDEGA PETO. Kiu scias ion pri s-o Šištin Sergej Petrovič, 22 jara, oficintan lastatempe sur st. Borza de Cita fervojo kiel helpanto de maŝinisto sur "bronejojzed" (kirasvagonaro) de l' nomo Trockii. La IV-25 j. li skribis lerton el st. Borza; la V. 25 j. li skribis jam el Vladivostoko (ne konfuzite sian adreson) kaj malaperis, pli mankas ĝis sciigo. Trosage kaj samideano mi petas sciantojn tian sintrovan komuniki al hiaj malfeliĉaj gepatroj laŭ adreso: S-o N. Ĵinski, fotografisto, Ĥinskaja 85, Saratov, Ruslando. [1]
Dum via libertempo vizitu Mechelen (Malines). — Sonoril-koncertoj ĉiulunde. — Programlibretoj kaj informojn petu al: A. Baesens, rue de la Station 16, Malines (Belgujo). [1]
Korespondado kaj Interŝanĝo.
S-o Voldemar Birk, Tallinn, Wambola 5-3, Estonio, deziras korespondi per il. PK bfl. kaj L nur kun orientlandanoj. PM ne kolektas. [2]
S-o Voldemar Kivimägi, Katuspää tian 10-5, Tallinn, Estonio, deziras korespondi per il. PK kun ĉiuj landoj. [2]
100 diversaj germanaj PM 5 sv. fk. aŭ samvaloro. Afranko ekstra. Adreso: Reinh. Piffczyk, Gladbeck i. W., Höhenstr. 10, Germanujo. [2]
S-o Max Lepczynski, Köln, Germanujo, Bürgerstr. 9, deziras korespondi per il. PK kaj L kun fraŭlinoj de la en-kaj eksterlando. [2]
S-o Fritiof Ahnfeldt, instruisto, del. UEA, Torskovs, Svedujo, deziras korespondi kaj interŝanĝi il. PK (bfl.) il. gazetojn, esperantaĵojn kaj aliajn objektojn por insruado. Kolektas ankaŭ PM, sed puraj kaj nedifektitaj. [2]
Po 200-500 poŝmarkoj de via lando mi sendas 200-500 PM de Germanujo. Mi respondos ĉiuj akurate. Adreso: S-o Erich Mums, Oelsnitz i. Vogtld. (Saksujo), Germanujo, Köfnerstr. 11. [2]
S-o Karl Haaf, Relaisstr. 55-57, Mannheim-Rheinauhafen, Germanujo, deziras korespondadi kun fraŭlinoj de la tuta mondo per il. PK. [2]
S-o Peter Braun, Düsseldorfstr. 39, Mannheim, Germanujo, deziras korespondadi kun fraŭlinoj de la tuta mondo per il. PK. [2]
S-o Rudolf Klein, frizisto, Relaisstr. 55-57, Mannheim, Germanujo, deziras korespondadi kun fraŭlinoj de la tuta mondo per il. PK. [2]
Perfekta bakisto 22 jara (majstrofilio) serĉas okupadon en la en- aŭ eksterlando kaj deziras korespondi per il. PK kaj L kun la tutmonda kolegario. Certa respondo. Antonio Bauer, Schwaig No. 48 bei Erding, Oberbayern, Germanujo. [2]
S-o Grünberg David el Taghina, Besarabio, kiu s-o Lack enŝipigis en Galac, sciigu tuj sian adreson al s-o Porcsin J. V. S., Balaton, Atlantic Ltd., 101 Leadenhall st., London E. C. 3, Britlando. [2]
ET numeroj: 59 ĝis 2/0 kun 24 mankoj vendeblaj kontraŭ ilustritaj geografiaj landopriskrivoj en franca, itala, germana, angla lingvoj. Skribu al J. Orzech, gynn. direktoro, Tarnow, Polujo. [2]
Ĉiu ebrio post 5 minutoj malaperas. Kostas 4 orpenigoj plene sendanĝera. Samideano ne trompas! Provsendaĵo antaŭpago 2 ormarkoj aŭ egalvaloro. Konrad Kreuter, Regensburg (Bayern), Kramgasse 1/11, Germanujo. [2]
Filatelistoj atentu! Kion mi povas ricevi interŝanĝe por Briefmarkenkatalog v. Michel 1924 en bona stato? Ofertojn sendu per il. PK al Prof. Miecz. Sygnarski, Bydgoszcz, Kordeckiego 19, Polujo. [2]
S-o Heinz Jung, Horrem/Köln, Germ., deziras korespondi kun Esperantistinoj per il. PK kaj laŭplaĉe ankaŭ lere. [2]
Mondvojaĝon faros per biciklo, seriozajn kunulojn mi serĉas, kiuj parolas pli da lingvoj. Skribu al: Danielo Moskovit, K. K. Felgy/hara, Hungario. [2]
S-o Piero Giolla, P. Seveso 50, Milano, Italujo, deziras interŝanĝi ĉion-ajn kun ruslingvaj gesamideanoj. (Leteroj havu ĉiam Esperanto-tekston nur flanko de rusa teksto, sur apartaj folioj). [2]
S-o Oskar Flad, Darmstädterstr. 81, Frankfurt a. Main-Sild p. k. & L. kun ĉiuj landoj, speciale kun libristoj kaj eldonistoj. Respondas nepre!